LA LASTA KOMUNIKO
AL LA FESTIVALANOJ!

Dum la preparoj de INTER-FEST ni devis fari plurajn ŝanĝojn, do per ĉi tiu komuniko ni deziras resumi ilin kaj faciligi al vi la restadon en Bjelovar.

1. INFORMADO: Pli detalajn informojn vi trovos en la **Festivala libro**, ricevota ĉe la Akceptejo en la festivalaj sakoj. Gravajn tagajn informojn ni publikigos en la **Festivala folio**, ĉiutage aperonta senpaga festivala bulteno.

2. AKCEPTEJO funkcios:

− **la 5-an de aŭgusto (sabato)** en la Hotelo Central (Adreso: Vatroslava Lisinskog 2) inter la **10h00 kaj 15h00**;

− **la 6-an de aŭgusto (dimanĉo)** en la Kulturdomo (Adreso: Ivana Mažuranića 6) inter la 8h00 kaj 9h00;

− **la 7-an de aŭgusto en la Altlernejo** (Adreso: Trg Eugena Kvaternika 4) **inter la 13h00 kaj 15h00**.

Ekster tiu horaro la akceptejaj deĵorantoj estos kontakteblaj antaŭ ĉiuj programoj en la Altlernejo.

3. SPECIALA FESTIVALA BUSO EL ZAGREBO ekveturos la 5-an de aŭgusto je la 8h00 antaŭ la Ĉefa fervoja stacidiomo. La sama buso startos de Bjelovar al Zagrebo la 6-an de aŭgusto je la 22h00. Tiun transporton uzos la festivalanoj, kiuj aliĝis laŭ la **Speciala oferto** (vidu la punkton 4), sed kunvojaĝi povas ankaŭ aliaj personoj pagante la vojaĝkostojn. Unudirekta bileto kostas 75,00 kunaojn, kaj ambaŭdirekta 150,00 kunaojn.

4. SPECIALA OFERTO inkluzivas: 1) vojaĝkoston de Zagrebo al Bjelovar la 5-an de aŭgusto (starto je la 8h00) kaj revojaĝon al Zagrebo la 6-an de aŭgusto (starto je la 22h00); 2) du unutagajn festivalajn biletojn; 3) unu tranokton (sen manĝoj) en dulitaj ĉambroj en la Tranoktejo Vita Nova; 4) vespermanĝon dum la Interkona vespero la 5-an de aŭgusto kaj 5) la antaŭfestivalan ekskurseton al Đurđevac (vidu la punkton 6). Prezo: 500,00 kunaoj. Se iun el la inkluzivitaj servoj vi jam pagis, la sumo de la Speciala oferto estos proporcie malaltigita.

5. ALIĜKOTIZOJ KAJ UNTUAGAJ BILETOJ: Ĉiu festivalano, kiu ne partoprenos la tutan festivalan semajnon, pagas unutagan bileton por ĉiu tago de sia partopreno. La prezo de unutaga bileto estas 40,00 kunaoj.

6. ANTAŬFESTIVALA EKSKURSO al Đurđevac okazos la 5-an de aŭgusto inter la 10h00 kaj 15h00. Interesiĝantoj bonvolu mendi ĝin ĉe la Akceptejo je prezo de 75,00 kunaoj (inkluzivita transporto kaj enirbiletoj). Pliaj detaloj en la Festivala libro.

7. INTERKONA VESPERO kun vespermanĝo, amuza programo kaj dancmuziko okazos la 5-an de aŭgusto inter la 19h00 kaj 23h00 en la Hotelo Central (Adreso: Vatroslava Lisinskog 2). Bonvolu antaŭmendi vian partoprenon kaj elekti la preferatan menuon (vidu la oferton en la Dua bulteno, paĝo 23). Prezo: 100,00 kunaoj (trinkaĵoj neinkluzivitaj).

8. SOLENA INAŬGURO komenciĝos la 6-an de aŭgusto je la 9h00 en la Kulturdomo (Adreso: Ivana Mažuranića 6).

9. KOMUNA FOTADO okazos ĉe la pavilono en la urba parko la 6-an de aŭgusto post la Solena inaŭguro (je la 11h00). Ni petas la festivalanojn nepre partopreni. Se vi volas mendi grandformatan paperan foton, bonvolu antaŭmendi ĝin ĉe la Akceptejo je prezo de 20,00 kunaoj kaj ricevi ĝin samtage post la Nacia koncerto.

10. SANKTA MESO en Esperanto por romkatolikoj okazos la 6-an de aŭgusto je la 18h00 en la katedralo de sankta Teresa de Ávila. La Esperanta mesbroŝuro ricevebla ĉe la enirejo. Tuj post la meso okazos koncerto de religiaj kantoj de Neven Mrzlečki.

11. RONDA TABLO pri la festivala temo Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo okazos la 7-an de aŭgusto en la Altlernejo (komenco je la 9h00). Se vi volas prezenti vian temon, bonvolu sendi ĝian titolon kaj kelkfrazan resumon.

12. DEKLAMKONKURSO okazos la 7-an de aŭgusto. Bonvolu aliĝi, sendante vian nomon kaj adreson, la titolon de la deklamota poemo kaj la nomojn de la aŭtoro kaj eventuala tradukinto.

13. FOIRO DE IDEOJ estos vera foiro dum kiu vi povos prelegi, diskuti en grupoj, proponi ideojn, preni kaj disdoni reklamilojn, informi pri viaj aranĝoj, vendi kaj interŝanĝi Esperantaĵojn. Nepre kunportu la bezonatan materialon kaj ideojn!

14. PIKNIKO en Veliki Grđevac okazos la 9-an de aŭgusto inter la 9h00 kaj 19h00. Kontraŭ la prezo de 60,00 kunaoj oni ricevos busvojaĝon kaj modestan tagmanĝon. Kunportu bankostumon! Se vi volas mendi ankaŭ tagan bileton por la lokaj naĝbasenoj, necesas krompagi 15,00 kunaojn. Organizeblaj ankaŭ neformalaj programetoj, kantado, muzikado, sportludoj ktp.

15. E-4: Zagreb-Stubica-Kumrovec okazos la 10-an de aŭgusto. La prezo de 225,00 kunaoj inkluzivas busveturadon, tagmanĝon kaj enirbiletojn. Prefere aliĝu tuj, kvankam ankaŭ surloke eblos aliĝi, se restos liberaj lokoj en la buso!

16. EKSKURSO E-5: Varaždin-Trakošćan okazos la 11-an de aŭgusto. La prezo de 225,00 kunaoj inkluzivas busveturadon, tagmanĝon kaj enirbiletojn. Prefere aliĝu tuj, kvankam ankaŭ surloke eblos aliĝi, se restos liberaj lokoj en la buso!

17. FILATELA KOVERTO KAJ POŜTA STAMPO. En la festivalaj sakoj vi ricevos senpagan ekzempleron de la speciale eldonita filatela koverto de INTER-FEST. Pliajn kovertojn vi povas aĉeti en la Akceptejo je 20,00 kunaoj. Speciala poŝta stampo de INTER-FEST estos uzata en la poŝtoficejo 43000 Bjelovar nur la 7-an de aŭgusto. Pri aliaj detaloj legu en la Festivala libro.

18. LIBROSERVO: Malgranda libroservo funkcios en la Altlernejo antaŭ kaj dum ĉiuj tie okazantaj programoj kaj ofertos bonkvalitajn librojn je tre favoraj (rabatitaj) prezoj.

19. URBOMAPO: En la festivalaj sakoj vi ricevos specialan mapon de la urbocentro de Bjelovar, sur kiu estas signitaj ĉiuj festivalaj ejoj kaj pluraj restoracioj kaj kafejoj, el kiuj kelkaj ofertas 10-procentan rabaton por siaj servoj al la festivalanoj. Vian partoprenon al INTERFEST vi devas pruvi per montro de la oficiala festivala ŝildo.

20. TAKSIO: Bjelovar ne havas publikan transporton, sed ofte uzatas taksioj. Starto de enurba taksia veturado kostas 20,00 kunaojn kaj inkluzivas 4-kilometran veturadon. Ĉiu aldona kilometro kostas 5 kunaojn. Ĉiuj loĝejoj uzataj de niaj festivalanoj, krom la tranoktejo Vita Nova atingeblas kontraŭ 20,00 kunaoj. Tamen antaŭ ol ekuzi taksion, bonvolu informiĝi pri la prezo.

Ĝis la baldaŭa revido en Bjelovar!